



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

LINGVOPOLITIKAJ POZICIOJ

Lingvoj kaj homaj rajtoj





Enhavtabelo

Enhavtabelo	2
Enkonduko	3
Lingvaj rajtoj kaj homaj rajtoj	4
Tekstoj kiuj rilatas al lingvopolitiko en la Esperanto-Movado	4
La Statuto de TEJO	4
Fundamentaj dokumentoj de la Esperanto-Movado	5
UNESKO-Rezolucioj pri la Esperanto-movado	6
Lingvaj rajtoj kaj internacie agnoskitaj homrajtaj tekstoj	6
Dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN)	6
Mondregionaj homrajtaj tekstoj	8
Internacia lingvopolitiko, la nuna stato	10
Lingva diskriminacio: enkonduko	10
Individuaj kaj kolektivaj lingvaj rajtoj	10
Kio estas la internacia lingvoproblemo?	11
Kial la angla ne estas solvo, samkiel ĉiu etna lingvo?	11
Hegemoniaj lingvoj, lingvaj imperiismoj kaj privilegioj	12
Plurlingveco en internacia komunikado	14
Esperanto, la lingvo internacia kiel solvo por internacia lingvopolitiko	15
Kial ni bezonas internacian helplingvon	15
La taŭgeco de Esperanto	15
Lingvo (trans)kulture riĉa	15
Lingvo strukture taŭga	16
Lingvodiverseco kaj lingvaj malplimulto: enlanda kaj regiona lingvopolitiko	18
Lingva diverseco kiel kultura trezoro	18
Valorigo de lingva diverseco kaj multlingveco	18
Kial valorigi lingvan diversecon?	18
Lingvaj diskriminacioj kaj lingvofobio	19
Ideala enlanda lingvopolitiko en edukado	19
Esperanto kiel komunumo kaj ĝia memstara valoro por la civitana socio	21
La socipolitika rolo de la Esperanto-Komunumo	21
Esperanto: lingvo aparta sed ne superranga	21
Konkludo	23
Bibliografio	24



Enkonduko

Tiu ĉi dokumento difinas la poziciojn de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) rilate lingvopolitikon. Ĝia celo estas duflanka.

Unuflanke, ĝi celas interne utili kiel referenco por la membraro de TEJO por lerni pri la oficialaj opinioj de sia organizaĵo pri lingvopolitiko, kiu estas unu el niaj kernaj celoj kaj aktivajoj kiel esperantistoj. Tio estas aparte grava en la reprezentado de TEJO ĉe neesperantistoj kaj eksteraj organizoj, ĉar ĉi tie troviĝas niaj oficialaj opinioj kaj pledoj. Laŭ ili oni poste difinu la eksterrilatajn strategiojn de nia organizaĵo.

Aliflanke, tiu ĉi dokumento celas alekstere prezenti kion opinias nia organizaĵo pri lingvopolitikaj demandoj, kiel laŭ ĝi internacia komunikado kaj lingva diverseco estas kaj estu, kaj kial la lingvo Esperanto estas la plej dezirinda ilo por tio.

Dezirinda lingvopolitiko kongruu kun la sekvaj fundamentaj principoj, pri kiuj ni kredas kaj kiujn ni intencas respektigi pere de tiu ĉi poziciaro: Egaleco, Justeco, Efikeco, Diverseco, Paco kaj Homaj Rajtoj.

Ĉi tiu dokumento fontas el la dokumento "Lingvopolitikaj pozicioj de TEJO" prilaborita de laborgrupo de la Komitato de TEJO dum IJK 2011 en Kijivo. Ĝi estis akceptita per posta voĉdono de la Komitato de TEJO dum ties eksterordinara kunveno en Gdansko, la 30-an de decembro 2011, okaze de Junulara E-Semajno (JES).

En novembro 2021, kadre de trejnado pri Homaj Rajtoj financita de Konsilio de Eŭropo (KdE) okazanta dum KKPS (Klaĉ-Kunveno Post-Somera) en Ry, Danio, estis decidite ĝisdatigi tiun poziciaron per pli ĝisfunda enhavo kaj pli homrajta bazo.

Post ekstrakto de pluraj aktivuloj, ĝi estis prilaborata de laborgrupo ekde la fino de 2021 kaj diskutita kaj aprobata de la Komitato de TEJO la 6-an de majo 2023 per reta voĉdono.

Tiu ĉi dokumento estis verkita, pridiskutita kaj voĉdonita nur en Esperanto, konforme al la oficialeco de tiu lingvo en la organizaĵo. La esperantlingva versio de ĝi do estas la originalo uzata en TEJO. Ajna traduko de ĝi al alia lingvo celas informi neesperantistojn pri la pozicioj de nia organizaĵo.



Lingvaj rajtoj kaj homaj rajtoj

Teksto kiuj rilatas al lingvopolitiko en la Esperanto-Movado

La Statuto de TEJO

La pozicioj ilustritaj en tiu ĉi dokumento unuavice baziĝas sur la [Statuto](#) de TEJO, kiu mencias celojn kaj agadojn (Ĉapitro 1) kiuj difinas la intereson kaj esencan ideon pri lingvopolitiko de la Organizo (emfazo aldonita):

1. **disvastigi** la uzadon de la internacia lingvo **Esperanto**;
2. [...]
3. agadi por la solvo de la **lingva problemo en internaciaj rilatoj** kaj faciligi la internacian komunikadon;
4. plifaciligi la **ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn** inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, genro, genra orientiĝo, religio, politiko aŭ **lingvo**;
5. helpi la junularon havi aktivan rolon en konstruo de **socio daŭripova, inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta**; [...]

Aldone, la sama ĉapitro listigas inter niaj kernaj agadoj:

- A. informado en junularaj medioj pri la **lingva problemo en internaciaj rilatoj** kaj pri ĝia **solvo per Esperanto**;
- B. praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj; [...].

La Ĉapitro 2 de nia Statuto tiel difinas niajn agadprincipojn:

5. Neŭtraleco

1. **TEJO kontraŭas diskriminacion** rilate al nacieco, raso, sekso, genro, genra orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno kaj **lingvo**.
2. **TEJO estas sendependa de ĉiu ajn partio**.
3. **TEJO estas neŭtrala pri aferoj nerilataj al ĝiaj celoj**.

6. Esencaj kondiĉoj

Por la agado de TEJO esencaj kondiĉoj estas:

1. **bonaj internaciaj rilatoj**;
2. **respekto de la homaj rajtoj** tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj; kaj
3. **daŭripova evoluo** laŭ la difinoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj.



Tiuj principoj estas reafirmitaj de la [Strategia Plano 2020-2025](#), kiu difinas ke:

“Esperanton oni vaste kaj tutmonde konas kiel taŭgan solvon al la lingva problemo. La tutmonda Esperanto-junularo kapablas agi kaj krei pli bonajn sociojn laŭ sia vasta spertaro. TEJO estas kunlaborreto por la tutmonda Esperanto-junularo kaj la junularaj organizoj kaj asocioj tutmonde.”

Fundamentaj dokumentoj de la Esperanto-Movado

La **Bulonja Deklaracio** (pli oficiale “[Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo](#)”) substrekas la gravecon de refondiĝo de internacia komunikado pere de lingvo kiel Esperanto. Ĝi estas verkita de L. L. Zamenhof mem kaj akceptita de la anoj de la unua Universala Kongreso (UK) en 1905. Ĝi difinas la Esperanto-Movadon, klarigas ĝiajn celojn kaj esencon, nome “disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa”. La Deklaracio certigas la neŭtralecon de Esperanto: “tial Esperanto estas “nenies propraĵo”, nek en rilato materiala, nek en rilato morala”.

La [Manifesto de Prago](#) pri la internacia lingvo Esperanto direktiĝas de Esperantujo ekstermovaden: “*al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo*”. La Manifesto estis akceptita dum la 81-a UK en Prago en 1996 kaj konsistas el sep kernaj principoj rilate al lingvopolitiko, kiujn ankaŭ TEJO konsideras siaj kaj sur kiuj inspiriĝas tiu ĉi dokumento. Jen ilia resumo:

1. **Demokratio:** La nuna komunika sistemo “tutvive privilegias iujn homojn” kaj estas “*maldemokratia*”; laŭ la Manifesto, Esperanto “*ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado*”.
2. **Transnacia edukado:** Esperanto kontribuas al tutmond-perspektiva edukado, ne nur kadre de specifaj landoj aŭ kulturoj.
3. **Pedagogia efikeco:** Pluraj studoj pruvis, ke Esperanto estas multe pli facile lernebla ol aliaj lingvoj kaj faciligas postan lernadon de pliaj lingvoj.
4. **Plurlingveco:** La lernado de Esperanto, kaj ofte konsekvence de aliaj lingvoj, ĝenerale kondukas al “*pli vasta persona horizonto*”.
5. **Lingvaj rajtoj:** En la Esperanto-komunumo la anoj de la diversaj lingvoj “kunvenas sur neŭtrala tereno” kaj ne okazas “*lingva subpremado*”. La nuna potencdiferenco inter la lingvoj malhelpas la konkretigon de multaj internaciaj tekstoj alvokantaj egalecan traktadon sendistinge de lingvo.
6. **Lingva diverseco:** Por la subskribantoj de la Manifesto lingva diverseco ne estas baro, sed kontraŭe - protektinda “*konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco*”.
7. **Homa emancipiĝo:** Dum ĉiu lingvo samtempe liberigas kaj malliberigas siajn anojn, Esperanto ebligas al ĉiuj partopreni la homan komunumon. “*Ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo*”.



UNESKO-Rezolucioj pri la Esperanto-movado

Esperanto kaj la Esperanto-Movado jam estas internacie agnoskitaj. La jarcenta laboro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de TEJO kiel ĝia junulara sekcio estis rekonata de UNESKO, pere de [du rezolucioj](#):

- **Rezolucio de Montevideo** (1954), kiu unuafoje agnoskas la atingojn kaj celojn de Esperanto kiel kongruajn kun la celoj kaj idealoj de UNESKO.
- **Rezolucio de Sofio** (1985) akceptita okaze de la centjariĝo de Esperanto, denove substrekas la gravecon, atingojn, intertempan progreson kaj valorojn de Esperanto por internacia komunumo kaj instigas membroŝtatojn al plua enkonduko de ĝi.

Lingvaj rajtoj kaj internacie agnoskitaj homrajtaj tekstoj

Ekde la kreiĝo de la lingvo, la Esperanto-movado strebadas pere de komuna lingvo al plibonigo de la mondo, pacaj, justaj rilatoj inter homoj kaj popoloj kaj respekto kaj digno de ĉiuj homoj. Tiuj moralaj principoj jure kaj politike konkretiĝas per la nocio de homaj rajtoj, laŭ kiuj ĉiu homo havas neforpreneblajn kaj universalajn rajtojn. Ĉar ili kongruas kun la celoj de la Esperanto-movado, kaj konkretigas ilin, homaj rajtoj estas kernaj al Esperanto-organizoj kiel TEJO kaj UEA.

Homaj rajtoj estas agnoskitaj kaj difinitaj de pluraj dokumentoj de internacia juro. Multaj el ĉi tiuj rajtoj konkretiĝas per lingvo, tial eblas paroli pri **lingvaj homaj rajtoj**. Lingva rajto estas la rajto elekti en kiu lingvo komunikiĝi, private aŭ publike. Kiel evidentiĝos dum la postaj paragrafoj, tiuj lingvaj rajtoj estas agnoskitaj de la sube menciitaj dokumentoj: tial la ĉi-dokumente asertitaj principoj speguliĝas ankaŭ en internacia juro. Ni esploros unue la deklarojn de Unuiĝintaj Nacioj (UN), la plej tutmonda interŝtata organizaĵo, poste tiuj de mondregionaj instancoj.

Dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN)

La [Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj](#) estas la plej fundamenta homrajta teksto de UN.

Artikolo 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj garantias la aplikeblon de tiuj homaj rajtoj al ĉiuj, sendepende interalie de lingvo. Sekvaj artikoloj implicate rilatas al lingvaj rajtoj:

- Artikolo 10 temas pri justa proceso, tio ne eblas se la akuzato ne komprenas la proceson aŭ ne povas esprimi sin en lingvo plene posedata.
- Artikolo 19 temas pri rajto je libereco de esprimado, kiu ne estas plena sen la libereco esprimi la vidpunkton en la plej komforta(j) lingvo(j).
- Artikolo 21.2 temas pri aliro al publikaj laborpostenoj en sia lando, kio favoras anojn de lingvogrupo se ties lingvo estas la ĉefa.
- Artikolo 23.1 temas pri rajto je laboro, kio pli facile plenumiĝas por scipovantoj de la lingvoj hegemoniaj.
- Artikolo 25.1 temas interalie pri rajto je medicina prizorgado, kio necesigas sukcesan komunikadon kun sanistoj.



- Artikolo 26 traktas la rajton je edukiĝo kiu, iuflanke, devus esti "akirebla" (do ankaŭ lingve alirebla), kaj aliflanke celi kreskigi "komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj". Tiurilate lingvolernado havas kernan rolon.
- Artikolo 27 traktas la rajton partopreni la kulturen vivon de la komunumo, kiu evidente disvolviĝas en iu lingvo.

La [Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj](#) (IPCPR) klare mencias kaj malaprobas lingvobazitajn diskriminaciojn en siaj artikoloj 4, 24, 26 kaj 27 kaj, kaze de proceso laŭ artikolo 14, la rajton de la akuzato je informado kaj laŭbezone interpretado en lingvo komprenebla de tiu.

La Internacia Pakto pri [Ekonomiaj, Socialaj kaj Kulturaj Rajtoj](#) (IPESKR) tuŝas plurajn temojn kun klara lingvorilata ligo:

- En artikolo 6.2, lige al la rajto je laboro, ĝi aldonas ke por tion plenumi ŝtatoj provizu teknikan kaj profesionan orientadon, kapabligon kaj programojn por certigi la konstantan ekonomian, socialan kaj kulturen evoluigon kaj la decan, vivtenan laboron. Ajna tipo de edukado rilatas al lingvo, ĉu pro la instruada lingvo de ĝi aŭ instruado de lingvoj por provizi iun per pliaj oportunoj.
- La artikolo 15.2, lige al la rajto je partopreno en la kultura vivo, postulas ke la ŝtatoj agu por gardi, evoluigi kaj disvastigi sciencan kaj kulturen.
- La artikolo 15.4 agnoskas la bonon de internaciaj kontaktoj kaj kunagado en scienco kaj en kulturo, kio klare postulas internacian komunikadon.

Nepre menciinda estas la [Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj](#), adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN en 2007, kiu havas klaran enhavon rilate al lingvaj rajtoj:

- La artikolo 13.1 garantias la rajton de indiĝenoj revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, perbuŝajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturon, kaj aldone la rajton asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj.
- La artikolo 13.2 asertas la rajton kompreni kaj esti komprenataj en politikaj, juraj kaj administraj procedoj, kaj ricevi se necese interpretadon.
- La artikolo 14 traktas edukadon en la propraj lingvoj kaj devigas al ŝtatojn, kunlabore kun la komunumoj, strebi por ke indiĝenoj havu aliron al edukado en sia propra lingvo, eĉ por tiuj kiuj loĝas ekster siaj komunumoj.
- La artikolo 16 temas pri la rajto starigi la proprajn amasmediojn en la propraj lingvoj.

La [Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj](#), kiu naskiĝis kun subteno de UNESKO, nek estis aprobita de superŝtata organizo nek estis ratifita de iu ajn ŝtato, do ĝia jura aŭtoritato estas ege pli malforta ol la supre menciitaj tekstoj. Aliflanke, ĝi estas enhance fundamente grava referenca teksto pri lingvaj rajtoj kun forta fokusiĝo pri la kolektivaj lingvaj rajtoj.

Laŭ sia artikolo 5, "la Deklaracio baziĝas sur la principo ke la rajtoj de ĉiu lingva komunumo estas egalaj kaj sendependaj de la jura aŭ politika statuso de ties lingvo, oficiala, regiona aŭ minoritata". Aparte interese estas, ke en la artikolo 13, ekzistas



rajto je plurlingvismo kaj je la lernado de la plej taŭga lingvo por la persona disvolviĝo aŭ socia movebleco.

Aldone, la [Deklaracio de la Rajtoj de la Infano](#) de 1959, kaj en sia enkonduko kaj en sia unua principo, subtenas la egalecon de ĉiuj infanoj sendepende de lingvo. La [Internacia Konvencio pri Infanaj Rajtoj](#) de 1989 emfazas eĉ pli forte ĉi tiun rajton.

Aldone:

- La artikolo 29 postulas ke edukado celu respekton de la propraj kultura identeco, lingvo kaj valoroj.
- La artikolo 30 garantias al infanoj el etnaj, religiaj aŭ lingvaj malplimultoj aŭ el indiĝena origino uzi sian propran lingvon.

Mondregionaj homrajtaj tekstoj

La unua internacie subskribita homrajta instrumento, la [Amerika Deklaracio pri la Rajtoj kaj la Devoj de la Homo](#) de 1948 (aŭ Deklaracio de Bogoto) mencias en sia artikolo 2 la egalecon antaŭ la leĝo de ĉiuj homoj sendepende de interalie lingvo. Samspirite la [Amerika Konvencio pri Homaj Rajtoj](#) (pli konata kiel Pakto de San-Joseo de Kostariko) de 1969 en sia artikolo 13 kondamnas malamparoladon kaj instigadon al perforto kontraŭ iu ajn homo aŭ grupo, inkluzive surbaze de lingvo.

Surbaze de la Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj de UN, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj aprobis en 2016 la [Amerikan Deklaracion pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj](#). Inter aliaj aldonadoj povas esti menciita ke en sia artikolo 15 ĝi postulas, ke la ŝtatoj kunlaboru kun la komunumoj por interkultura edukado kiu reflektu la mondkonceptojn, lingvojn kaj kulturojn de ĉi tiuj popoloj.

La [Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj](#) de Konsilio de Eŭropo (KdE) jam en 1950 asertis la gravecon de lingvo por justa proceso en siaj artikoloj 5 kaj 6. En 1992, membroŝtatoj de KdE subskribis la [Eŭropan Ĉarton pri Regionaj aŭ Malplimultaj Lingvoj](#), kun plene lingva fokuso. En sia enkonduko, ĝi asertas ke uzado en privata kaj publika vivo de regiona aŭ malplimulta lingvo estas neforigebla rajto. La ĉarto enhavas kelkajn minimumajn postulojn cele al la protektado de la lingvaj rajtoj de malplimultlingvanoj rilate al edukado, justico, publikadministrado, amaskomunikiloj, kulturaj agadoj kaj infrastrukturoj, socia kaj ekonomia vivo kaj translimaj interŝanĝoj.

La [Ĉarto pri Fundamentaj Rajtoj de Eŭropa Unio](#) de 2000 asertas la respekton de kultura, religia kaj lingva diverseco en sia artikolo 22. La artikolo 41 difinas la rajton de ajna homo alparoli EU-instancojn en unu el la EU-lingvoj kaj ricevi samlingvan respondon.

La [Afrika Ĉarto pri Homaj kaj Popolaj Rajtoj](#) de 1981 eliras de la kutima kadro de individuaj homaj rajtoj kaj aliras ankaŭ kolektive la temon de "popolaj rajtoj". Ĝi asertas ke koloniitaj aŭ subpremataj popoloj rajtas liberiĝi de tiu regado kaj rajtas je la asisto de aliaj landoj en sia lukto por liberiĝo politika, ekonomia aŭ kultura kaj ke tiu evoluo okazu en strikta kadro de respekto de libereco kaj identeco kaj de egala ĝuado de la komuna havaĵo de la homaro.



TEJO opinias, ke ĉi tiu kultura liberiĝlukto signifas ankaŭ la defendon de la subpremataj lingvoj kaj ke internacia neŭtrala helplingvo estas esenca ilo por efektiviĝi vere egalan ĝuadon de la komuna havaĵo de la homaro.

La [Araba Ĉarto pri Homaj Rajtoj](#), aprobita de la Ligo de Arabaj Ŝtatoj en 2004, prezentas denove la gravecon de lingvoj en justico sed ankaŭ protektas la rajtojn de la anoj de malplimultoj ĝui sian kulturon, uzi sian lingvon kaj praktiki sian religion ene de leĝa kadro. Ĝi krome devigas la ŝtatojn klopodi laŭeble garantiigi egalajn ŝancojn sen distingo surbaze de, interalie, lingvo kaj nacia deveno.

La [Deklaro pri Homaj Rajtoj de la Asocio de Sud-Orient-Aziaj Nacioj](#) (ASOAN) de 2013 atentigas, ke la plenumadon de la homaj rajtoj oni devas konsideri kaj regionskale kaj naciskale laŭ malsamaj politikaj, ekonomiaj, leĝaj, sociaj, kulturaj, historiaj kaj religiaj fonoj. Rilate la rajton je edukado, tiu ĉi deklaro mencias ankaŭ, ke ĝi devas ebligi ĉiujn efektive partopreni en la socio kaj antaŭenigi komprenon, toleron kaj amikecon inter naciaj, rasaj kaj religiaj grupoj.



Internacia lingvopolitiko, la nuna stato

Lingva diskriminacio: enkonduko

Pere de lingvoj la homo organiziĝas kaj konstruiĝas kiel individuo kaj kiel socio. Lingvo estas en ĉio ĉi nevidebla gluo.

La denaskaj lingvoj (unu aŭ pluraj laŭ la familio kaj socia fono) estas ricevataj kaj ne elektitaj de la individuoj: ilin transdonas gepatroj kaj la devena medio. Pro tio, ili estas esencaj ecoj de ĉiu persono, simile al haŭtkoloro, sekso, etna aŭ socia aparteno. Diskriminacio surbaze de lingvo estas do same maljusta kaj malakceptinda.

Tre ofte lingva diskriminacio estas konsekvenco de diskriminacio surbaze de aliaj ecoj kiel etno, sociekonomia grupo aŭ religio, kiuj fonas de malamo kontraŭ specifa grupo. Tia pluranea diskriminacio indas je aparta konsciiĝo kaj kontraŭbatalo.

Kapablo vivi per flue parolata lingvo estas antaŭkondiĉo por plena aktiveco kaj civitaneco en ajna socio. Eĉ la **homaj rajtoj, kiuj devas esti fundamento de ĉiuj socioj, ofte laŭ la lingvo uzata efektiviĝas kaj malefektiviĝas**: tia lingva aspekto estas ofte miskomprenata kaj subtaksata. Elektro alirebligis specifajn servojn aŭ oportunojn en iuj lingvoj sed ne en aliaj havas socialajn konsekvencojn.

Tiu konstato ligas lingvajn rajtojn al pluraj aliaj homaj rajtoj, inter aliaj: la aliro al jura protekto kaj al publikaj servoj, edukigo, libera sinesprimado kaj partopreno en la regado de la propra lando, socia organizo kaj kultura vivo. Tion plurfoje substrekas la antaŭe menciitaj internaciaj tekstoj pri homaj rajtoj.

Preter la homaj rajtoj, protektado de lingvoj gravas politike, ekonomie, science kaj kulture. Protekti lingvon kaj lingvajn rajtojn signifas protekti la konkretajn interesojn de la parolantoj, iliajn eblojn studi, labori kaj politike aktivi. Funkciperdo de iu lingvo signifas kulture kaj materie malprivilegii la denaskajn parolantojn de tiu lingvo.

Individuaj kaj kolektivaj lingvaj rajtoj

TEJO agnoskas kaj individuajn lingvajn rajtojn (kiel la rajton je propra nomo kaj la rajto uzi ajnan lingvon private kaj publike) kaj kolektivajn lingvajn rajtojn (kiel la rajton je instruado de sia lingvo aŭ de justa reprezentado en amaskomunikiloj). Tiuj du tipoj de rajtoj estas interdependaj.

Kolektivajn lingvajn rajtojn posedas lingvokomunumoj. Tiuj rajtoj ofte necesas por efektiviĝi la individuajn lingvajn rajtojn, kiel aliro al justico, edukado aŭ publikaj servoj en la lingvo(j) de specifa lingvokomunumo. Alidirekte, individuaj lingvaj rajtoj antaŭsupozas favorajn kondiĉojn de la lingvokomunumo. Konkrete, la individua rajto paroli lingvon publike neniĝas kiam la ĉirkaŭa socio perdas komunikkapablon en iu lingvo ĉar ĝi ne plu estas instruata aŭ transdonata aŭ kiam la publika regado ne ebligas interagon en tiu lingvo.

Individuaj lingvaj rajtoj ne povas pravigi subfosadon de kolektivaj lingvaj rajtoj, ĉefe tiuj de indiĝenaj, minoritataj kaj dominataj lingvoj. Aliflanke, kolektivaj lingvaj rajtoj



ne iĝu ilo por lezi la homajn rajtojn de minoritatoj per superrego de dominanta lingvo super minoritataj.

Ĉar paco estas nereakta celo de la Esperanto-Movado, ni aldone substrekas ke respekto de homaj rajtoj, lingvaj rajtoj kaj sendominaj rilatoj inter lingvoj kaj popoloj kreas favorajn cirkonstancojn por daŭripova paco, enlande kaj tutmonde. Ni strebas kontribui al tiu celo proponante taŭgan rimedon por justa kaj efika tutmonda komunikado kaj interkompreniĝo.

Kio estas la internacia lingvoproblemo?

La "problemo(j)" de internacia komunikado estas plurflanka(j). Unuflanke ni bezonas efikan komunikadon. En tre diverslingva mondo, tio eblas nur kiam ekzistas, silente aŭ malferme, konsento ke ĉiuj lernu almenaŭ unu komunan lingvon. La elekto de unu el la naciaj lingvoj tamen kaŭzas grandan malegalecon en la mondo. Denaskuloj de tiu dominanta lingvo ĝuas multajn avantaĝojn tra la mondo en pluraj kampoj (komerco, kulturo, edukado kaj scienco) dum la resto de la mondo devas klopodadi lerni ilian lingvon kiel fremdan. Tiel nedenskuloj perdas signifan parton de sia esprimkapablo en la fremda lingvo kaj iĝas flankenmetitaj de internaciaj komunikadoj. Tio estas ankaŭ malŝparo de homa inteligenteco, pro diskriminacio laŭ lingvo kaj ne justa elekto laŭ kompetento aŭ fakeco.

Tio aparte konkretiĝas kiam estas malkonverĝaj intereso, ekzemple kiam oni devas defendi sian starpunkton en kortumo aŭ kiam oni konkuras por aljuĝo de komisiono aŭ subvencio: tiam la rajto uzi la denaskan lingvon al kelkaj partoprenantoj estigas konkretan malegalecon kiam konkuras denaskaj kaj nedenskaj parolantoj, kun eblaj ekonomiaj kaj sociaj konsekvencoj. En iuj kazoj, tio lezas eĉ la bazajn homajn rajtojn ĉar, kiel ni daŭre rimarkas, multaj rajtoj plenumiĝas lingve. **Lingva baro iĝas baro al homaj rajtoj.**

Aliflanke ankaŭ de la vidpunkto de komunikado la elekto de nacia lingvo ne estas efika. Ili povas esti tre taŭgaj por komunikado ene de unu nacio aŭ lingvokomunumo, sed ne nepre internacie. Lingvo kiu servu la homaron kiel komunikilo inter homoj de malsamaj denaskaj lingvoj havu aliajn trajtojn ol lingvo parolata de siaj denaskuloj: tia lingvo estu kiel eble plej facile lernebla. Tial, ĝi havu plejeble regulajn gramatikon kaj ortografion, flekseblajn sintaksan kaj vortkrea sistemon por ke nedenskaj parolantoj povu trovi esprimeblon relative naturan al si.

Kial la angla ne estas solvo, samkiel ĉiu etna lingvo?

Etna lingvo historie disvolviĝis kaj estas denaske parolata de unu aŭ pluraj gentoj male ol planlingvo kiel Esperanto. Ĝi povas esti nacia lingvo aŭ ne. La termino "nacia lingvo" en ĉi tiu dokumento estas uzata por signifi etnan lingvon, kiu celas tutlandan komunikadon ene de aparta lando, teritorio aŭ etno, ofte kun simbola kuniga rolo por tiu nacio kaj ŝtata subteno aŭ oficialeco.



Nuntempe la angla (etna kaj nacia lingvo, eĉ plurnacia) estas la plej uzata lingvo por internacia komunikado. Ĝi relative disvastiĝis en la mondo, kaj fakte ebligas al nemalmultaj homoj komuniĝi internacie, eble pli multe ol iam ajn antaŭe en la homa historio. Tamen, restas multe da sociaj grupoj kaj teritorioj en kiuj scipovo de la angla lingvo estas tre limigita aŭ eĉ nula. Konkrete, la angla estas la denaska lingvo de 7% de la homaro kaj estas sufiĉe bone komprenata de nur unu kvarono de la monda loĝantaro, dum 70% entute ne scipovas ĝin. En la kazo de Eŭropa Unio, se juraj kaj politikaj tekstoj estus nur en la angla, ili estus malfacile alireblaj por kvar kvinonoj de la civitanaro, kaj entute nekompreneblaj de preskaŭ duono.¹ Tio malhelpas al plejparto de la homaro integriĝi en la mondajn komunikadon kaj ekonomion. **La uzo de nacia lingvo kiel internacia lingvo, eĉ se ĝi estas jam monde disvastigita, ne povas krei veran egalecon en komunikado.**

Internaciaj helplingvoj havas specialan rolon en komunikado, ĉar ili devas ebligi komunikadon inter homoj kiuj denaske parolas malsimilajn lingvojn, kun diversaj fonetiko, gramatiko kaj vortoj. Ili ankaŭ devas esti efikaj en tre diversaj kuntekstoj, eĉ kiam iliaj parolantoj havas malaltan lingvan nivelon. Pro tio, **Esperanto pli taŭgas ol ĉiuj etnaj lingvoj, ĉar ĝi estis kreita celkonscie al efikeco kun logikaj kaj regulaj strukturoj** kiujn oni malofte trovas en la internacie uzataj etnaj lingvoj.

La angla por TEJO estas unu el la etnaj kaj naciaj lingvoj, same kiel ĉiuj aliaj. Ĝi estas esprimmedio de tre riĉaj kulturoj, forte ligita al la koloniismaj, povhavaj Britio kaj Usono, kies kulturon ĉefe peras la angla lingvo. Laŭ kvanto de parolantoj ĝi certe estas unu el la plej grandaj mondaj lingvoj. Tamen, en tiuj kampoj kie la angla estis elektita kiel (unu el la) lingvo(j) uzenda(j) por internacia komunikado, ĝi laŭ TEJO reprezentas arbitran elekton, kiu kaŭzas lingvan diskriminacion kaj komunikajn neefikecojn. Forte kontribuas al tiu neefikeco pluraj enaj ecoj de la angla, kiel ĝiaj kompleksa vokalsistemo, abundo da neregulaj verboj, ampleksa vortprovizo, neintuicia uzado de prepozicioj kaj plejgrave ekstreme malregula ortografio.

La angla kiel lingvo certe ne estas la malamiko, same ne ĝia uzado aŭ instruado en maniero inkluziva kaj neperforta. Tiuj personoj kaj instancoj subtenantaj la privilegian rolon de la angla povas esti niaj kontraŭuloj, depende de siaj argumentoj. Niavide, la angla lingvo estas kaj estu ĉefe (plur)nacia lingvo anstataŭ internacia lingvo, same kiel aliaj lingvoj kiel la araba, franca, hispana, portugala, rusa aŭ svahila.

Hegemoniaj lingvoj, lingvaj imperiismoj kaj privilegioj

La ampleksa disvastigo de pluraj naciaj lingvoj estas konsekvenco de historia imperiismo de kelkaj ŝtatoj aŭ civilizacioj. Tial kelkaj el la plej parolataj lingvoj de la mondo, interalie la angla, araba, franca, hispana, portugala aŭ rusa lingvoj aparte disvastiĝis. Per konsciaj politikoj historie prestiĝiĝis apartaj lingvoj, interalie tiuj ĉi, kio nuntempe speguliĝas ĉe internaciaj instancoj, en komerco kaj en komunikado. Tiuj kelkaj lingvoj akiris eĉ hegemonian rolon enlande kaj internacie, forpuŝante kaj

¹ [Multilinguisme à l'ONU : une urgence ! -Jean Fabre - UN Today](#)



malplikreskigante aliajn kaj ties lingvanarojn. La uzo de dominantaj lingvoj kiel internaciaj lingvoj daŭrigas tiun imperiisman heredaĵon.

Estas konsiderinda la **"hegemonilingva privilegio"** de la denaskaj parolantoj de tiuj lingvoj, kiuj troviĝas en aparte favora situacio pro manko de postulo - ene de la kunteksto en kiu regas tiu lingvo - lerni alian lingvon aŭ adaptiĝi al fremdaj normoj. Tio tamen nek kondamnu la parolantojn de dominantaj lingvoj, kiuj plej ofte ne mem respondecas pri tiu stato, nek malestimigu la lingvon mem aŭ kulturajojn peratajn de ĝi.

Tia hegemonia lingva situacio povas diverskuntekste okazi naci-, land- aŭ region-skale.

En la monda lingva ordo, tutmonde aparte rolas la angla lingvo. Tial denaska scipovo de ĝi donas konkretajn privilegiojn, ne nur tie, kie ĝi estas (fakte aŭ jure) oficiala lingvo. Tiu **anglalingva privilegio** manifestiĝas diverskuntekste, internacie kaj enlande, kaj kontribuas al pli alta statuso de scipovantoj de la angla. Tiu privilegio estas unuagrade tiu de denaskaj parolantoj de la angla, kaj aligrade de lernintaj parolantoj de la lingvo ankaŭ. Tio ĉi konsistigas privilegion, kiun TEJO opinias nejusta. Kelkaj ekzemploj estos sube ilustrocele menciitaj.

En edukado kaj scienco ĉi tiu rolo de la angla lingvo ofte donas al ties denaskaj parolantoj la privilegion ne bezoni fremdajn lingvojn kaj la aliron al studprogramoj en ties lingvo, eĉ en neanglalingvaj landoj. Dume, plejpartego de la lingvoj ne estas uzataj por supera edukado² kaj, eĉ kiam ili estas uzataj, parto de la lernomaterialo ne disponeblas en la koncerna lingvo. Pli ĝenerale denaskuloj de la angla povas trovi plej facile en sia denaska lingvo tradukon, ĉu de kulturajoj, ĉu de informoj kaj indikoj pri aferoj ĉiutagaj, ekzemple turismaj broŝuroj, aŭ pri temoj ekstreme kompleksaj, ekzemple faka esplorado.³

Labormerkate denaska scio de la angla lingvo estas nekomparebla avantaĝo: iufanke en multaj postenoj kono de la angla estas postulata aŭ almenaŭ forte preferata, aliflanke ofte ĝi estas la nura lingvo kiu ebligas aliron al altnivelaj laborpostenoj eksterlande, foje eĉ sen kono de ajna loka lingvo.

Uzado de la angla kiel internacia lingvo kreas maljustecon enlande eĉ tie, kie ĝi ne estas loka lingvo. Homoj kiuj troviĝas en pli favora sociekonomia situacio estas ofte ankaŭ tiuj kiuj atingas pli altan nivelon de formala edukado kaj kiuj havas aliron al kromaj lingvokursoj kaj al eksterlanda lernado por rafini sian lingvokonon. Pro tio, altenspezuloj havas fortan ekonomian kaj kulturan avantaĝon. Aliflanke, homoj kun malpli da rimedoj havas limigitan aliron al studado de la angla, kaj pro tio al multe malpli da ŝancoj en la labormerkato kaj en studado.

² Nur 82 lingvoj estis uzataj en 2002 por universitata edukado. ["Concise Encyclopedia of Applied Linguistics". "Languages in Tertiary Education" \(paĝ. 298\)](#)

³ ["Top Languages in global information production" - Sergey Lobachev](#)



Tiu “hegemonilingva privilegio” de parolantoj de la angla speguliĝas ankaŭ ekonomie kaj politike inter landoj. Internaciskale, anglalingvaj landoj plurflanke profitas de la domina situacio de sia lingvo.

En la ekzempla kazo de Eŭropa Unio (EU), kie preskaŭ ĉiuj naciaj lingvoj estas oficialaj, la defakta pontlingva rolo de la angla kaj ĝia ĝenerala instruado enspezigas inter 10 kaj 18 miliardojn da eŭroj jare al la ekonomio de Britio kaj male elspezigas tiun de alilingvaj landoj (laŭ studo de 2005, kiam Britio membris en EU). Tiu sama esploro konkludas, ke uzado de Esperanto kiel pontlingvo en EU (institucie kaj per publika instruado) ŝparigus entute 25 milardojn da eŭroj jare (laŭ la tiama estimo) kaj estius la plej justa kaj efika lingvopolitika elekto, kompare kun nuruzado de la angla aŭ plivalorigo de kelkaj naciaj lingvoj.

Ne haveblas pli freŝa simila studo pri la temo; tamen konkludeblas, ke la malekvilibro krestiĝis ekde 2005 pro la membriĝo de neanglalingvaj landoj al EU kaj malmembriĝo de Britio. Se tiuj konkludoj temas specife pri Eŭropa Unio, ili ankaŭ lasas imagi la potencialon de simila solvo ankaŭ por aliaj mondopartoj, tutmondscale kaj por aliaj internaciaj organizoj.

Plurlingveco en internacia komunikado

La plejparto de la homaro estas almenaŭ dulingva. TEJO taksas plurlingvecon celinda kaj lingvan edukadon subteninda.

Tradukado kaj interpretado plenumas gravan rolon en loka kaj internacia komunikadoj. Ili esencas, ekzemple, en jura kunteksto por justa proceso kaj plena informado al civitanoj, samkiel en la sansistemo, en komerco, en rilatado kun ĵusaj enmigrintoj kaj pli ĝenerale por efektive ebligi plurlingvecon. TEJO kredas ke la publikaj institucioj havas la devon provizi tian lingvan subtenon, minimume por la efektivigo de la homaj rajtoj, kiel tio estas postulata por justico de pluraj homrajtaj tekstoj menciitaj pli frue. Tiu bezono por plurlingveco ne estas nur postulo morala, sed ankaŭ praktika, ĉar avantaĝa al la propra kredebleco, akcepto kaj efiko de instancoj ĉe civitanoj.⁴⁵ Tradukado ankaŭ ĉiam rolis grave por alirebligi kulturaĵojn preter lingvaj baroj.

Tamen nek maŝintradukado nek homa tradukado estas seneraraj. Ili ofte postulas homajn kaj financajn rimedojn al kiuj ne ĉiuj povas aliri, des pli en plurlingva kunteksto kiam la eblaj lingvaj kombinoj multege kreskas kaj aldonas erareblon.

Krome en multegaj situacioj tradukado kaj interpretado, eĉ plej bonaj, ne povas anstataŭi la rektecon, rapidecon, konfidencecon kaj emociecon de rekta komunikado per komuna lingvo. Do, kvankam tradukado kaj interpretado estas grave necesaj, ili ne sufiĉas por solvi la lingvoproblemojn.

⁴ [Translation and multilingualism - Laura Johnson kaj Egor Ovcharenko - UN Today](#)

⁵ [Multilinguisme à l'ONU : une urgence - Jean Fabre - UN Today](#)



Esperanto, la lingvo internacia kiel solvo por internacia lingvopolitiko

Kial ni bezonas internacian helplingvon

Ni deziras ebligi al ĉiu homo en la mondo komunikiĝi egalece pere de efika ilo kun ĉiuj aliaj homoj. Tio plej bone eblas kiam ĉiuj homoj lernas aldone al sia(j) denaska(j) lingvo(j) la saman komunan internacian lingvon, tiel ke **neniu lando aŭ gento altrudusian propran lingvon al la aliaj.**

Kiel supre menciite, pluraj homaj rajtoj plenumiĝas lingve, tial ĝenerala altnivela scipovo de internacia lingvo havus avantaĝojn de homrajta vidpunkto, ĉar ĝi ebligus la garantiadon de homaj rajtoj, kiel ekzemple medicina prizorgo sen la kostoj, la malrapidigo kaj la erar-risko de tradukado kaj interpretado. Internacia lingvo povas esti homrajta ebligilo.

La uzado de lingvo neŭtrale homa kiel internacia lingvo ankaŭ evitus fortigi la lingvan malegalecon, kiun kaŭzas la uzado de naciaj lingvoj internacie. Tiu ĉi solvo kontribuas al pli da egaleco inter la kulturoj kiujn tiuj lingvoj peras kaj ĉefe inter ties parolantoj, kiuj alikaze havus pli simetrian aliron al informoj kaj ŝancoj per siaj denaskaj lingvoj pro la dominado de neniua nacia lingvo.

Rilate internacian lingvopolitikon, ni kredas ke Esperanto estas la plej serioza, taŭga kaj justa kandidato por roli kiel internacia helplingvo. Ĝi estas la plej konvena komuna lingvo por internaj komunikado kaj verkado en internaciaj organizaĵoj, por internacia komerco, por akademia kunlaboro kaj por diplomaciaj rilatoj inter landoj kiuj ne havas komunan lingvon. Krome ĝi povas roli kiel pontolingvo por tradukado kaj interpretado, tiel ke plej multaj civitanoj havu laŭeble aliron al informoj en sia denaska lingvo sen multetapa perado.

Krom sia rolo en grandinstituciaj kuntekstoj, Esperanto per sia alirebleco ankaŭ estu interkomprenigilo por pli ĉiutagaj traktadoj, kiel turismo, vojaĝoj aŭ kulturaj interŝanĝoj. Kie lingvopolitiko entenas devigan lernadon de iu fremda lingvo, ni preferas vidi Esperanton en tiu loko ol ajnan nacian lingvon.

Esperanto estas kaj solvo kaj solvilo en internaciaj rilatoj, kiu plenumas homajn rajtojn.

La taŭgeco de Esperanto

Lingvo (trans)kulture riĉa

Esperanto neniel estas eksperimenta lingvo sed jam plene funkcia kaj uzebla rezulte de pli ol 135 jaroj da daŭra praktikado kaj uzado. La lingvo disponas riĉan



literaturon originalan kaj tradukitan kaj teĥnikajn terminarojn en diversaj kampoj (ekz. komerca, matematika aŭ fervoja). Regule estas eldonitaj novaj libroj pri diversaj fakoj, kaj originalaj kaj tradukaĵoj.

Ekzistas pluraj radiaj programoj, revuoj, podkasto, filmetkanaloj, blogoj kaj novaĵportaloj, kaj oficialaj de Esperanto-organizaĵoj kaj de sendependaj lingvanoj. La lingvo mem, kaj ankaŭ esperantologio, estas instruataj en pluraj universitatoj kaj lernejoj, kelkaj kursoj estas provizataj eĉ en Esperanto.

Esperanto estas ankaŭ oficiale reguligata lingvo, same kiel pluraj naciaj. Ekde 1905 la Akademio de Esperanto gvidas kaj poluras la uzadon de la lingvo responde al la bezonoj de la parolantoj kaj la sociaj evoluoj. Aldone, la lingvo havas referencan unulingvan vortaron ([Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto - PIV](#)) kaj eblas oficiale pruvi la scipovon de la lingvo pere de lingvoekzamenoj en la niveloj de B1 ĝis C2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

Esperanto pretas servi la homaron kiel neŭtrale homa komunikilo. Ĝi en si mem ne portas nacian aŭ gentan kulturon, kvankam specifa Esperanto-kulturo kreskas jam pli ol jarcento ekde ĝia publikigo en 1887. La kulturo de Esperanto estas transnacia, transkultura kulturaro kiu pliriĉiĝas per naciaj kulturoj kaj donas pli bonan supervidon pri ili, ebligante novan kreadon. Tiel ĝi estas ponto inter kulturoj.

Pli grandskala internacia komunikado povas kaŭzi malrapidan alproksimiĝon de ekzistantaj kulturoj. Tio okazus same uzante ajnan lingvon por internacia komunikado. La diferenco estas ke kiam la angla servas kiel internacia lingvo, la anglalingvaj kulturoj (ĉefe, sed ne nur, la brita kaj usona kulturoj) pli facile influas aliajn kulturojn ol inverse. Ili ne kreas interŝanĝejon de kulturoj sed nur eksportas sian kulturon kiel pretan varon.⁶⁷ Por protekti aliajn kulturojn, oni subtenu la memvalorigon de ĉiuj nacioj, popoloj kaj gentoj. Tio pli facile eblas en lingvosistemo bazita sur la principo de egaleco kaj ne sur dominado de arbitre elektita lingvo.

La rolo de Esperanto estu tiu de internacia helplingvo inter homoj kun malsamaj denaskaj lingvoj, de la individua ĝis la superŝtata nivelo, eventuale ene de plurlingvaj landoj kaj socioj.

Lingvo strukture taŭga

Esperanto estas lingvo kiu dekomence estis elpensita por roli kiel internacia helplingvo. Ĝi havas gramatikon facile lerneblan kaj aplikas kelkajn taktikojn por limigi la kvanton de lernendaj bazvortoj, plipotencigante la esprimopovon. Ĝiaj elparolaj normoj estas en la praktiko sufiĉe permesigaj kaj bonvenigas akĉentan diversecon.

Esperanton oni ofte kritikas pro tio ke ĝia vortoprovizo estas ĉefe bazita de la hind-eŭropaj lingvoj, precipe de la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj. Unue, oni konsciu,

⁶ [Index Translationum - UNESCO](#)

⁷ [Movie Languages - The Numbers](#)



ke tiu vasta lingvofamilio estas parolata en ĉiuj kontinentoj. Multaj el tiuj lingvoj havas apartan leksikan unuecon pro latina heredaĵo. Notindas, ke kelkaj origine okcidenteŭropaj lingvoj havas pli da denaskuloj ekster Eŭropo kaj tial ne povas esti konsiderataj nur eŭropaj. Estas tiel pri la hispana, la portugala kaj la angla en Ameriko. Tie, ili iĝis plene lokaj amerikaj lingvoj.

Ekster hind-eŭropaj lingvoj, ene de la sama kontinento aŭ lando tre ofte eblas renkonti grandegan vortaran diferencon inter ies lingvo kaj tiuj de la najbaroj de alia lingvofamilio, kiu ofte ne estus supera ol la vortara diferenco inter la propra lingvo kaj Esperanto. Krome kelkaj ecoj de Esperanto, kiel ĝia aglutineco, estas multe pli oftaj en aliaj lingvofamilioj ol la hindeŭropa.

Pli grave, la gramatiko de Esperanto, bazita sur reguleco kaj vortkombineblo, aldone al ĝiaj kongruaj kaj simplaj ortografio kaj elparolo, spegulas lingvajn principojn ofte ekzistantajn en plej diversaj naciaj lingvoj kaj universale alireblajn al la homa lingvemo sed malofte kuntroveblajn en ajna nacia lingvo. Do kvankam ne eblas nei, ke Esperanto estas speciale facila por parolantoj de hind-eŭropaj lingvoj, ĝi ankaŭ tre alireblas al parolantoj de ajna lingvo. Tial TEJO asertas, ke kompare kun la nuna situacio kun regado de la angla, **la malegaleco klare malgrandiĝus pro pli vasta uzo de Esperanto kaj grandiĝus la efikeco.**



Lingvodiverseco kaj lingvaj malplimultoj: enlanda kaj regiona lingvopolitiko

Lingva diverseco kiel kultura trezoro

Valorigo de lingva diverseco kaj multlingveco

TEJO subtenas kaj strebas al la protektado kaj valorigado de lingva diverseco. Lingva diverseco ne temas nur pri la nombro de lingvoj parolataj en unu teritorio, sed ankaŭ pri la stato kaj vigeleco de tiuj lingvoj kaj iliaj parolantoj. TEJO subtenas la uzadon kaj la instruadon de ĉiuj lingvoj parolataj, skribitaj aŭ signaj kaj la sociajn kaj ekonomiajn agadojn celante lingvan diversecon.

Ni subtenas la egalajn lingvajn rajtojn de ĉiuj homoj kaj lingvokomunumoj. Naciaj malplimultoj do havu la rajton uzi sian minoritatan lingvon en ĉiuj kampoj ene de la historiaj teritorioj de la minoritato. Lernado de la loka lingvo, ĉu minoritata aŭ ne, por novaj enloĝantoj estas tre rekomendinda kaj subtenenda de lokaj instancoj, interalie por helpi al integriĝado de ĉiuj novalvenintoj en la ekzistantan socion. Tiel eblas eventuale kompensi la ĉeflingvanan privilegion de denaskuloj de la plimulta lingvo.

TEJO ankaŭ agnoskas la apartan valoron de signolingvoj. Ni subtenas por ĉiuj, inkluzive de surduloj, senvoĉuloj kaj nesenvoĉuloj la lernadon de ili por ampleksigi ĉies komunikrimedojn.

Kial valorigi lingvan diversecon?

Preter la respekto de la lingvaj homaj rajtoj de la parolantoj, TEJO valorigas lingvan diversecon pro kvar ĉefaj kialoj:

- Lingva diverseco kaj respekto de kultura identeco: lingva diverseco estas ofte ligita al kultura diverseco. TEJO subtenas homan rajton je kultura identeco, kaj specife la rajtojn de malplimultoj, kies lingvojn kaj kulturojn oni endanĝerigas.
- Kultura heredaĵo: lingvoj estas kolono de kultura diverseco kaj per ĝi esprimiĝas literaturo (voĉa kaj skriba), sed ankaŭ tradicioj, kolektivaj memoroj, esprimmanieroj kaj pensmanieroj.
- Persona kaj kolektiva multlingvismo kiel lingvopolitikaj celoj: persona kaj kolektiva plurlingvismo ebligas al homoj aliri diversajn lingvokomunumojn, sciojn kaj oportunojn, pli facile komunikiĝi en diversaj mondopartoj, kaj ankaŭ havas kognajn avantaĝojn por individuoj.⁸
- Scienca valoro je lingva diverseco: lingva diverseco havas valoron por la scienca progreso, aparte en lingvistiko (ja malapero de plejparto de la studkampoj neripareble limigus la scieblon pri la lingva fenomeno), sed

⁸ [The Cognitive Benefits of Being Bilingual - Viorica Marian kaj Anthony Shook - Cerebrum](#)



ankaŭ de aliaj sciencaj branĉoj, ĉar kelkaj lokaj lingvoj enhavas scion pri lokajoj⁹. Tio ekzemple estas la kazo de kono pri medicinaj plantoj kiu nur troviĝas en unu aŭ manpleno da indiĝenaj lingvoj en Ameriko aŭ Nov-Gvineo.

10

Lingvaj diskriminacioj kaj lingvofobio

Lingvo estas esenca parto de homa identeco kaj kultura heredaĵo, kaj necesa al socia interago. Konsciigi kaj atentigi pri lingvaj diskriminacioj estas unu el la kernaj celoj de TEJO. Lingva diskriminacio, alinome "lingvofobio" signifas ke oni diskriminacias homojn surbaze de la lingvo(j) kiu(j)n ili parolas, aŭ surbaze de ties parolmaniero (kiel akĉento, dialekto aŭ lingva trajto).

Lingvofobio kaj akĉentofobio estas atentindaj kaj kombattendaj. Ni ankaŭ atentigu, ke la ofte substrekita diferenco inter "lingvo" kaj "dialekto" estas pli politika ol lingvosciencia: malantaŭ tiu distingo ofte kaŝiĝas la volo rangigi lingvojn diverse favoritajn de historio kaj konsekvence la gentojn aŭ grupojn, kiuj parolas ilin.

La ŝlosilo al daŭrigo de malplimulta lingvo estas valorigo de tiu ĉi lingvo, ĉu per ekonomia, identeca, kultura aŭ edukada rimedo(j).

Ideala enlanda lingvopolitiko en edukado

Konsiderante la jam menciitajn principojn, TEJO proponas la jenan ŝablonon kiel politikon por lingvopolitiko, adapteblan laŭ la kunteksto, tradicioj kaj celoj de la koncerna loĝantaro, tiel ke en la lernoprogramo de ĉiu lernejo estu kerna plurlingveco:

- Loka(j) lingvo(j), ĉu en komumnormigita formo, ĉu en la loka varianto: tiel ke ili pluestu ĉiutage parolataj en ĉiaj publikaj kaj privataj kunteksto(j) en la koncerna teritorio.
- Lingvo(j) tutlanda(j) aŭ regiona(j) (se malsamaj de la lokaj): por faciligi tutlandan aŭ regionan kunligon.
- Esperanto: kiel propedeŭtika kaj internacia lingvo.
- Aldonaj laŭvolaj lingvoj, kiel fremdlingvoj: ajnaj lingvoj laŭ elekto, kun aparta atento al najbaraj lingvoj kaj aliaj lingvoj de la lando (indiĝenaj, signolingvoj, klasikaj aŭ lingvoj de enmigrintoj).

Estas menciinde, ke multe pli facilas lerni kompreni ol paroli alian lingvon. Tial almenaŭ baznivela instruado de genealogie proksimaj lingvoj estas aparte kuraĝiginda por strebi al pasiva plurlingvismo kiu ebligu reciprokan interkompreniĝon en la propra lingvo.

⁹ [Language extinction triggers the loss of unique medicinal knowledge - Rodrigo Cámara-Leret kaj Jordi Bascompte - PNAS](#)

¹⁰ [Language and ethnobiological skills decline precipitously in Papua New Guinea, the world's most linguistically diverse nation - Alfred Kik, Martin Adamec, Alexandra Y. Aikhenvald kaj Vojtech Novotny - PNAS](#)



Pri la instrulingvo, TEJO forte pledas ke ĝenerala instruado okazu almenaŭ parte en la loka lingvo iuflanke por certigi la lingvan transdonon kaj tiel subteni la lingvan diversecon, faciligi instruadon per tujkomprenebla lingvo kaj por ke lingvo estu ligilo inter ĉiuj infanoj, sendepende de la familia deveno kaj ne maniero apartigi la homojn laŭ lingva grupo ekde la plej frua aĝo. Ni ankaŭ subtenas ke supera edukado estu kiom eble plej alirebla en la lingvoj de la koncerna teritorio kaj ni subtenas internaciecon de supera edukado per programoj kiuj enhavas la lernadon en la lokaj aŭ naciaj lingvoj kaj la instruadon de ili al la nelokaj studentoj.

Resume, instruado de lingvo devas esti enkadrigita en justan kaj efikan lingvopolitikon kiu celu plenumigi la lingvajn rajtojn de la teritorianoj, valorigi lingvan diversecon kaj faciligi la komunikadon kun najbaraj komunumoj kaj kun la tuta mondo.



Esperanto kiel komunumo kaj ĝia memstara valoro por la civitana socio

La socipolitika rolo de la Esperanto-Komunumo

Ni, la esperantistaro, estas tutmonda (plur)lingva komunumo. Ĝi, ekde 1887, kunigas homojn de diversaj lingvaj, kulturaj kaj geografiaj fonoj, cele al la plibonigo de la mondo diversmaniere, sed ĉiam per dono de komuna lingvo al la homaro.

Pro siaj idealoj, esperantistoj estis ofte persekutataj, precipe de diktaturoj. Ĉi tia minaco ĉiam povas reveni ie ajn, kie ŝovinismo, agresemo kaj naciismo subfosas la valoron de interkompreniĝado kun homoj de diversaj fonoj favore al nacia izoligo, kiu ekskludas diversajn homojn kaj spertarojn.

Tamen, Esperanton oni ofte malestimas kaj taksas senutila aŭ malsukcesinta projekto pro tio, ke ĝia "Fina Venko", sukceso kiel ĉies dua lingvo, klare ne konkretiĝis ĝis nun. Tio videble ĝustas, sed neniel malvalorigas nian lingvon kaj la intereson de ĝia komunumo.

La Esperanta komunumo multon kapablis kaj kapablas organizi, krei kaj kunlaborigi sur sia tereno. Aperas pro Esperanto ĉiujaraj eventoj en malsamaj kontinentoj, artaĵoj diversaj (literaturo kaj originala kaj tradukita, teatro, kino, muziko kaj aliaj), faciligataj vojaĝoj, novaj renkontoj, malkovroj, amikeco inter diversaj homoj kaj eĉ familiigoj. Tio en si mem, laŭ multaj iaspeca venko eĉ se ne la longe sopirata, **valorigas la lernadon kaj uzadon de Esperanto.**

Ni volas vidi Esperanton pli amplekse uzata ene de internaciaj institucioj, komerco kaj interŝanĝoj kaj tial pli vaste instruata. Ni samtempe ankaŭ celas la agnoskon de la valoron de nia komunumo kaj movado. Samkiel alispecaj movadoj TEJO celas, ke Esperanto estu fame konata kun pozitiva, fidinda kaj prestiĝa bildo. Tiel oni vaste sciu, ke per Esperanto oni lernas, edukiĝas, kapabliĝas, kleriĝas kaj kontribuas al kreado de pli bona mondo.

Esperantistoj cetere ne nur zorgas pri lingvaj problemoj kaj esperantlingvaj kreaĵoj sed ankaŭ pli ĝenerale celas plibonigi nian mondon kaj aktivis en aliaj kampoj kaj movadoj, ekzemple demokratio, daŭripoveco, transnacia edukado, alireblo, homa emancipiĝo, packonstruado kaj genra egaleco.

Tiel ni pravas ke Esperanto estas **internacia ilo por solvi tutmondajn problemojn**, kaj tiel ni prezentu ĝin al la cetero de la mondo.

Esperanto: lingvo aparta sed ne superranga

Aldone, ni agnoskas la apartan historion, rolon, funkcion kaj celaron de Esperanto kiel lingvo. Samkiel ni postulas la respekton kaj agnoskon de ĉiuj lingvoj kaj lingvanoj fare de ĉiuj, ni tion deziras ankaŭ por Esperanto kaj la esperantistoj.

Ni do substrekas, ke malgraŭ la ĉi-dokumente esprimitaj aparteco kaj kvalitoj de la lingvo, ĝin ni konsideras valore samranga al aliaj lingvoj kaj ne celas, ke ĝi



malaperigu aliajn lingvojn. Ni asertas la respektindecon de la elekto paroli la Internacian Lingvon, la valoron de Esperanto kiel komunikilo kaj ke kulturaĵoj, klerigaĵoj kaj projektoj en Esperanto ne havas malpli da valoro kaj interna digno ol tio kio okazas alilingve. Pli ol 40 jaroj post la [Manifesto de Raŭmo](#), ni kredas ke la esperantistoj efektive kapablas diri "*ion kulture originalan kaj internacie valoran*".

Precizindas ke TEJO ne celas la agnoskon de Esperanto kiel lingvo de etna malplimulto. La traktado de Esperanto kvazaŭ minoritata lingvo aŭ de esperantistoj kvazaŭ etna malplimulto povus plifortigi la ligojn ene de la ekzistanta Esperanto-komunumo (kiun cetere ne ĉiuj esperantistoj samgrade partoprenas), sed donus la impreson de certgrada fermiteco. Ĉefe, tio malkongruus kun la celo ke Esperanto iĝu ĝenerale uzata kaj alirebla lingvo.



Konkludo

TEJO, pro siaj propraj valoroj unuflanke, kaj pro internacie agnoskitaj homaj rajtoj aliflanke, rekonas la plenan dignecon de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj kaj subtenas la egalajn rajtojn de ĉia lingvokomunumo.

En diverslingva mondo necesas almenaŭ unu komuna lingvo, por faciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj. Eĉ homaj rajtoj, tiaj kiaj ili estas agnoskitaj de Unuiĝintaj Nacioj kaj internaciaj instancoj, plenumiĝas ankaŭ lingve: do, lingvaj baroj portas al malrespekto de homaj rajtoj.

Tamen elekti nacian lingvon kiel internacian lingvon estas arbitra fonto de maljusteco kiu donas gravan privilegion al la denasklingvanoj de la hegemonia lingvo, nuntempe la angla. Krome tio kreas malefikecon kaj starigas murojn al la glata, daŭripova, ekvilibra progreso de la homaro.

TEJO opinias Esperanton la plej taŭga kandidato por la rolo de internacia helplingvo, pro ĝia faciliga reguleco, pro ĝia historio kiu pruvas daŭran praktikadon kaj uzadon diversfakan dum pli ol 135 jaroj kaj pro ĝia transnacia kulturo.

Ni pledas por ke lingvaj baroj nenie plu malhelpu la respekton de homaj rajtoj, ke ĉiu agnosku la egalecon de ĉiuj homoj kaj sekve de ties lingvoj kaj ties kulturoj kaj ke ekzistu malferma socio en kiu ĉiuj homoj povu sukcese kaj egalece internacie komunikiĝi. TEJO asertas, ke tio estas homa rajto — pli precize, ke **internacia lingvo estas rajto de la homaro kaj ke Esperanto estas ĝia ebligilo.**



Bibliografio

- (20 lingvoj) *La Rekomendoj de Oslo pri la Lingvaj Rajtoj de Naciaj Malplimultoj*
- (franca) François Grin, *L'enseignement des langues comme politique publique*.
- (angla) *The Cambridge Handbook of Endangered Languages* - Peter K. Austin & Julia Sallabank
- (germana) **Cyrell Brosch** & Sabine Fiedler (2017), *Der spezifische Beitrag des Esperanto zum propädeutischen Effekt beim Fremdsprachenlernen (mit Schwerpunkt auf der Erwachsenenphase!)*, Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, paĝo 11, Academie.edu, [PDF](#) (elŝutebla)
- (angla) *Esperanto as a Foundation Course for Foreign Language Teaching* (PDF), [Academie](#), en: Rao, A. Giridhar (2009). *Esperanto as a Foundation Course for Foreign Language teaching*. In: **Giridhar Rao**, (eld.). *Foreign Language Teaching in India: Challenges and Strategies*, Hyderabad, India: Allied Publishers, [ISBN 978-81-8424-672-8](#), paĝoj 108-123
- (angla) Karen Roehr-Brackin, Angela Tellier, *Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school*, 76 paĝoj, [ISBN 9780902756359](#) (resumoj de la malkovroj faritaj kadre de la projekto "Springboard to Languages")
- (itala) Pinto, M. A. e Corsetti, R. (2001), *Ricadute metalinguistiche dell'insegnamento dell'esperanto sulla lingua materna dell'alunno: Un'esperienza nella scuola media italiana*, en: *Language Problems & Language Planning*, 25/1: 73-90
- (angla) Bishop, J. (1997). *Esperanto as a propaedeutic language in the primary school*. 60-70n paĝoj, Australian Federation of Modern Language Teachers Associations (AFMLTA), 11-a Nacia Lingva Konferenco, Hobart Tas, Aŭstralio.
- Zlatko Tišljar: *Lingvo-orientiga instruado (LOI) cele al rapidigo de la lernado de fremdlingvoj*, en: *Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj*, Inter-kulturo, Maribor, 1996.
- Helmar Frank: *Kibernetike-pedagogia teorio de la Lingvo-Orientiga Instruado*, *Kybernetische Pädagogik/Klerigkibernetiko*, Band 6, paĝoj 311-331, Paderborn 1993
- Helmar Frank: *Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo*, *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko*, Band 6, paĝoj 424-442, Paderborn 1993
- H.Frank kaj E. Formaggio: *La profito el propedeŭtika (speciale lingvo-orientiga) instruado depende de aĝo kaj transfero*, *Grkg/Humankybernetik*, Band 33, *Kajero 4* (1992), p. 164-174
- Elisabetta Formaggio (1989): *Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado*, *Grkg/Humankybernetik*, Band 30, *Kajero 4*, p. 141-151
- Helmar Frank (1987) *Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo: Kibernetika teorio kaj empiriaj rezultoj de la Lingvo-Orientiga Instruado de la Internacia Lingvo kiel bazo de pli posta lernado de etnaj lingvoj*. In Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo, II (Esperantismo) (La Laguna: Universidad de La Laguna), p. 213-222.



- (germana) Yukio Fukuda: *Zur rationalisierten Fremdsprach-Lehrplanung unter Berücksichtigung der (z.B. deutschen oder japanischen) Muttersprache*. Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft 21, p. 1-16, 1980
- Evelyn Geisler: *Mezurado de la lernplifaciligó de la angla pro ILo*, Eŭropa Dokumentaro, Nro. 25/1980, paĝo 4
- Istvan Szerdahely: *La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj*, En Internacia Pedagogia revuo, kajero 0/1979
- Helmut Sonnabend: *Esperanto: lerneja eksperimento. Raporto, analizo, konkludo*, Edistudio, Pisa 1979
- Evelyn Geisler: *La unuaj mezuradoj pri la lernplifaciligó inter la Internacia kaj la Angla lingvoj*, Eŭropa Dokumentaro 21/1979, p. 9-10
- (hispane) Bonilla, Gilda Muñoz. *Esperanto, auxiliar en pedagogía intercultural*.
- (hispane) Pesquera Alonso, Carlos. *Esperanto: un idioma con valores (2021)*: 279-284.
- (portugale) de França, Luana Araújo e Aline Lucena. *Sobre o direito à comunicação no mundo globalizado e a esfera linguística da diplomacia atual*. Revista de Geopolítica 3.2 (2016): 163-172.
- (france) Fabre, Jean: *Multilinguisme à l'ONU : une urgence !*. UN Today, 2022.
- (angle) "Concise Encyclopedia of Applied Linguistics". "Languages in Tertiary Education", 2006.
- (angle) Lobachev, Sergey: *Top Languages in global information production*, 2009.
- (angle) Johnson, Laura & Egor Ovcharenko, *Translation and multilingualism*, UN Today, 2022.
- (angle, france kaj hispane) *Index Translationum - UNESKO*
- (angle) *Movie Languages - The Numbers*
- (angle) Marian, Viorica & Shook, Anthony, *The Cognitive Benefits of Being Bilingual*. Cerebrum, 2012.